

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 5/2017



Vintraj Tagoj, Hyvinkää
17.–18.3.2018, p. 8–12



ESPERANTO
Reilua viestintää
Räitins Kommunikation

- ♦ Somera Kurso 5.–9.6.2018, Wellamo-opisto, Lahti p. 14–15
- ♦ Katalunio! Katalunio! ♦ Bunta kongreso en fora sudo de Italio, p. 4–5
- ♦ Ĉu rekta maŝininterpretado jam realaĵo?, p. 17

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.
Originajn tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.
Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ brilanto@gmail.com
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisinpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300
Kansi/Pärm/Kovrile: En la fervoja muzeo. Foto/Kuva: Raita Pyhälä

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry
Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi
Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi
Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ brilanto@gmail.com
Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com
Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ kuhanenarja@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:
Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoeo73@gmail.com
Miamaria Saastamoinen, ☎ 050 32 89 612 ✉ miamaria.saastamoinen@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA: FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH
(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 264 2742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

100? Ne nur, historio sen komenco kaj fino!

Kiam vi legos ĉi tiun numeron de Esperantolehti, jam pasis la sendependiĝa datreveno de Finnlando (6.12.1917) kaj la naskiĝtaga de L.L. Zamenhof (15.12.1859). La subaj strofoj finas du prifestatajn jarojn, jarcenton de la respubliko kaj la 130 jarojn de Esperanto.

Laŭtleĝu, kantu laŭ Kalevala ritmo-melodio!



Atentado de l'jarcento la unua respublika
de Finnlando kompletiĝis en la sesa de decembro
post tutjara prifestado hejme kaj en eksterlando,
de la stato inter ŝtatoj kaj l'popolo en homaro.

Niaj karmemoraj patroj kaj patrinoj historiaj
aĝas pli ol la jarcenton ĵusan de l'sendependeco;
antaŭ ekde jardek-milo oni vivis sur terlango
"tie ĉi, sur tedaj teroj, ĉe l'ekstrem' de l'hordaj limoj".

Oni jam antaŭe vivis en jarmilgeneracioj
tie ĉi kaj aliloke, kie ajn natur' permesis,
serĉis, trovis viveblecojn, setlis, formis vivmedion,
tiel semis la kondiĉojn de socia solidiĝo.


Homo estas la kreskejo de la semo plej valora;
tiu estas homa lingvo por ordigi la konscion,
ĝin esprimi kaj dividi, por konstrui kolektivon,
kunpercepton de la sensoj, kunefikon de la membroj.

Sonojn, vortojn ni heredis de perantoj nenombreblaj,
nenombreblaj, nekonataj, de tre longe forpasintaj,
restigintaj l'plej valoran posedaĵon posteulan:
"kion la prapatroj kantis, kreis nia nobla gento."

Herouloj historiaj estas ne la konkerintoj
detruintaj landojn, urbojn, sklavigintaj ties homojn;
gloron havu l'konstruintoj, kiuj kreis la kulturon
bazan, de viv' materia, kaj la pintan, de la vorto.

Tiu gloro adresita estu tie ĉi enlande
al plejfruaj gepapatroj kaj al nunaj kulturantoj
de landlingvoj, ne nur finna; kaj tutmonde, ni sekvantoj
de la nobla idealo de la vera komunlingvo.

*Inter la 6-a kaj la 15-a de decembro
Tuomo Grundström*



Katalunio! Katalunio!

Siru Laine loĝas kaj laboras en Barcelono, Katalunio, situanta en Hispanio – sed laŭ la opinio

de multaj ĝia stato devus esti tiu de sendependa ŝtato. Ŝi fotis kaj taksas la situacion.



”Ni voĉdonu por esti liberaj” – Amaso da homoj partoprenis demonstracion septembre en la urbocentro de Barcelono. Mi aŭdis ke unu loka esperantisto kaj mia amiko *Gerard* intencis partopreni, kaj mi scivoleme iris kun li. Kvankam ĉeestis miloj da homoj, la etoso estis paca kaj amika – iam kun tiam da homoj povas okazi io ajn, specife kiam temas pri politiko, sed en tiu tago ĉiuj kantis kune.

* Estelado estas la kataluna flago, noto de la redaktoro.



”Ke nur kisoj kovru nian buŝon” – Unutage mi promenis en la urbocentro kaj vidis multegajn gejunulojn promenante kun la esteladoj*, kaj mi sekvis ilin dum iom da tempo. Kelkfoje, kiam mi aŭdas gejunulojn krei ”la stratoj ĉiam estos niaj” aŭ ”ĉi tiu jam okazis dum Franco”, mi ŝatus scii ĉu ili pensis pri la eblaj konsekvencoj de sendependiĝo – kio okazus kun la membreco de Eŭropa Unio, ekzemple? Aŭ pri kiel oni povus havi justan voĉdonadon? Neniu scias, kio okazos dum la vivo de tiuj ĉi gejunuloj; eble Katalunio sendependiĝos, eble ne, sed espereble oni trovas pacan solvon al la longdaŭra polemiko.

Bunta kongreso en fora sudo de Italio

La ĉi-jara itala kongreso de Esperanto okazis en la sud-italia urbeto *Policoro*, kvankam la organizantoj asertis, ke ili kongresas en *Herakleo*. Temas pri tio, ke en tiu loko ekzistis greka urbo Herakleo antaŭ pli ol du mil jaroj. Tiu historia fono reflektiĝis ankaŭ en la prelegoj kaj dumkongresaj ekskursoj.

El la vidpunkto de cetera Italio tiu regiono (provinco *Basilicata*) estis kaj daŭre estas fora. Por atingi Policoron ni veturis per longdistanca aŭtobuso el Romo ses horojn. Tio tamen estas malmulte kompare al antaŭaj jardekoj. Nun la vojoj estas modernaj, per multaj tuneloj kaj pontoj oni facile transiras geografiajn obstaklojn.

Eblas nur imagi kia la vivo tie estis antaŭ 80

jaroj. Prio tio rakontas *Carlo Levi* en sia fama libro *Cristo si è fermato a Eboli*, esperantigite *Kristo finhaltis en Eboli*. La finna traduko tamen nomiĝas *Jumalan selän takana*. Pro sia kontraŭfaŝisma agado la aŭtoro estis arestita kaj ekzilita al la sudo. La verko rakontas pri liaj spertoj en tiu regiono. Nuntempe oni kreis centron kiu nomiĝas literatura parko en la urbeto *Aliano* kie li restadis. Vizito de ĝi kun du-lingva seminario estis unu el la kongresaj programoj.

Okazis du interesaj seminarioj samtempe. Unu el ili pritraktis la esperantan gazetaron kaj ĝin gvidis *Osmo Buller*. Pri tio mi ne povas multon diri, ĉar mi partoprenis la alian “De

informado kaj konsciigo al publikaj rilatoj”. Ĝin gvidis *Lu Wunsch-Rolshoven*. Li aktivis en multaj roloj en Esperantujo, i.a. kiel gazeta komisiito de Germana Esperanto-Asocio. Ofte en Esperantujo oni parolas pri la neceso informi, sed malofte oni renkontas tiel sobran kaj bone pripensitan argumentadon kun multaj praktikaj konsiloj.

Tria menciinda ekskurscelo estis la urbo *Arberobello* (en provinco Apulio), centro de trullo-domoj. Ili kreiĝis antaŭ jarcentoj rezulte de ruza truko por eviti pagon de dom-imposto. Temas pri konusformaj ŝtondometoj, konstruitaj sen mortero. Oni povis facile malkonstrui ilin kiam venis la reĝaj impostkolektantoj kaj remeti la ŝtonojn post ilia foriro. Tiom firmaj ili estas, ke ili staras eĉ nun kaj fariĝis unika vidindaĵo por vizitantoj.

Ĉi tie mi povas tuŝi nur kelkajn aspektojn de la kongreso, sed mi ne forgesu unu gravan eron



Lu Wunsch-Rolshoven.

de la italaj kongresoj, nome komunajn manĝadojn. Ĉiutage ni ricevis tiutagan menuon kaj devis elekti, kion ni volas manĝi dum la tago. Ĉiam estis haveblaj i.a. regionaj pasto-specialaĵoj kaj diversaj fiŝoj. El la antaŭa jaro mi jam sciis, kiaj estas italaj matenmanĝoj: kremaj

kornetoj, tortoj kaj aliaj dolĉaĵoj.

Kiel kutime, la vesperoj estis dediĉitaj al varia kultura programo. I.a. okazis koncerto de *Kajto* kaj teatra prezentaĵo de itala trupo *La Confraternita del Chianti*. Estis eĉ nokta programo, kiun prizorgis italaj gejunuloj.

La venontjara itala kongreso okazos ‘eksterlande’, nome en la respubliko *San Marino*. La tempo estos 18.–25.8.2018. La temo de la kongreso estos ‘malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj’.

Sakari Kauppinen
esperantohelsinki.wordpress.com



Sakari ĉe la kongresejo.



Castelmezzano.



Kajto.

Premio La Torre

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI kunlabore kun la Familio La Torre anoncas konkurson pri esplor-laboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, Profesoro *Mauro La Torre* (1946–2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis Profesoron Mauro La Torre Honora Membro.

La esplor-kampoj estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidato anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon **ĝis la unua de Januaro 2018** al *Mireille Grosjean* (*mirejo.mireille@gmail.com*). Tiu anonco estu dokumento proks. unupaĝa kun mencio pri la esplor-kampo elektita (vidu supre), prezento pri la preciza temo (200 ĝis 300 vortoj). Tiu dokumento entenu mallongan prezenton de la kandidato / kandidatino (nomoj, loĝlokoj antaŭaj kaj nuna, aĝo, retadreso), de liaj/ŝiaj antaŭaj studoj kaj esploroj, kaj aktivecoj en ligo kun Esperanto. Reago de ILEI sekvos ĝis la 15-a de Januaro.

- La ILEI estraro kaj la familio La Torre stariĝos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplorklaboro.

- La laboro devas esti nova esploro farota por la Premio.
- La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj.
- La litertipo estas libera, ĝi estu ne tro baroka. La marĝenoj estu normalaj, mezaj. La interlinia spaco estu 1,5.

La laboraĵo estu transdonita en reta formo al *ilei.prezidanto* ĝis la 30-a de Aprilo 2018, kaj en papera formo po unu ekzemplero al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio (la kandidato ricevos la stratadresojn de la ricevontoj) (entute kvin ekzempleroj).

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30-a de Junio 2018. La gajninto devos sendi ok paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas po unu, al diversaj gravaj bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI “Ni Savu Niajn Semojn”.

La premio konsistas el sumo de 500 €. ILEI retenas al si la rajton eventuale publikigi la gajnintan raporton.

La premio estis transdonita la unuan fojon en la jaro 2015 okaze de la 48-a ILEI-Konferenco en *Oostende*, Belgio, kaj anoncita dum la 100-a Universala Kongreso de UEA en *Lille*, Francujo.

La konkurso okazadas poste ĉiun duan jaron. En ĉiu konkursjaro la premio estos transdonita en la tiujara kongreso de ILEI kaj vaste prezentita en la samjara Universala Kongreso de UEA.

Ekzistas interna regularo inter ILEI kaj la familio La Torre pri la starigo, konsisto kaj laboro de la ĵurio.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Agrabla renkonto en Hämeenlinna

Estis pluvema dimanĉo en aŭgusto kiam *Raita Pyhälä* kaj ŝia sveda amikino *Kerstin Rohdin* alvenis en *Hämeenlinna* por renkonti nian grupon. Kune ni faris ekskurson.

Ni veturis per du aŭtoj al preĝejo *Pyhän Ristin kirkko* en *Hattula*, kaj hazarde ĝuste tiam la paroko servis senpagan kafon kaj ankaŭ ni povis trinki. Juna gvidistino bone rakontis kaj klarigis murpenetraĵojn de la preĝejo svede.

Post manĝo en malgranda restoracio apud lago *Vanajavesi* ni veturis norden al *Sääksmäki*, nuntempe parto de la urbo *Valkeakoski* kaj tie al *Visavuori*. Ni rigardis ŝercodesegnaĵojn de *Kari Suomalainen* en Kari-pavilono kaj sekvis gvidadon pri artisthejmo kaj ateliero de la skulptisto *Emil Wikström* (1864–1942). Ankaŭ la loko plaĉis al ni, monteto sur duoninsulo kun belega pejzaĝo.

Kerstin kunportis kaj donacis al ni sepdek

leterojn adresitaj al la verkisto *Anna Lorenz* el la jaroj 1988–1989. Ili estas respondleteroj al korespondanconoj en gazetoj el Bulgario, Hungario, Sovetio, Germanio, Ĉeĥoslovakio. Ŝi esperas ke ni povos iel vekti ilin, kvankam ni ne povas kontaktiĝi kun ili. Poste ni legis ĉi tiujn leterojn kaj parolis pri ili dum nia kunveno. La sendintoj de la leteroj estis el gejunuloj ĝis emeritoj, ili havis diversajn profesiojn kaj okupojn, Kelkaj rakontis pli multe pri si mem, kelkaj nur ke ili volus korespondi eĉ kun iu ajn. Nun nia grupo pripensas, kiel ni povus utiligi ĉi tiujn leterojn el tempo antaŭ la falo de Berlina muro.

Dum reveturo al Hämeenlinna pluvegis, sed kiam ni akompanis Kerstin kaj Raita ĝis la trajno, ni sentis ke la tago lasis bonan memoron.

Eila Dahlman

Trejnseminario en Hyvinkää 16.3.2018

Karaj samideanoj!

Bonvenon en la unua trejnseminario por la Universala Kongreso en Lahti en julio 2019! La seminario okazos vendrede antaŭ la Vintraj Tagoj en *Hyvinkää* kaj estas malferma por ĉiuj membroj de EAF kaj al aliaj esperantistoj, kiuj pretas agi kiel volontuloj dum la kongreso. Al la diversaj flankoj de la kongresaranĝado nin enkondukas diversaj spertuloj. Estraranoj de EAF rakontas pri la kongresejo kaj pri la aktuala situacio de la aranĝoj tiam en marto.

Loko: Hotelo Cumulus City Hyvinkää (antaŭ VT)

Tempo: Vendredo, 16.3.2018. Komenco je la 12-a, kafo en mezo, fino je la 18-a, poste vespermanĝo

Aliĝo: Aliĝu plej laste la 10-an de marto 2018 al la sekretario de EAF. La seminaria tago estas senpaga por la partoprenantoj kaj inkluzivas ka-

fon kaj vespermanĝon. Aliĝo nepras. Eblas peti rekompencon de vojaĝo- kaj tranoktadokostoj de la estraro de EAF.

Kontaktulo: Tiina Oittinen, sekretario de EAF, informoj sur paĝo 2.

Temoj de la seminario

Bonvenigaj vortoj. Estraranoj de EAF (15 min)
Kiel aranĝi Universalan Kongreson? *Osmo Buller*, *Jukka Laaksonen* (45 min)

Prezentado de la kongresejo *Isku Areena* en Lahti. EAF-estraranoj (30 min)

Informado lige al la kongreso. *Jukka Pietiläinen*, *Larissa Bister* (60 min)

Kongresa universitato. *Jouko Lindstedt* (30 min)

Arta programo. *Timo Väänänen* (konsultas) aŭ iu el la estraro (30 min)

Ekskursoj. Tiina Oittinen (30 min)

En la fino konkluda diskuto.

Vintraj Tagoj – Talvipäivät Hyvinkää 17.–18.3.2018

PROGRAMO – OHJELMA (ŝanĝoj eblas, *muutokset mahdollisia*)

VENDREDO/PERJANTAI 16.3.2018

12.00–18.00 Trejnseminario, vidu apartan alvokon kaj programon kaj aliĝu.

SABATO/LAUANTAI 17.3.2018

10.00–12.00.....Jarkunveno de ELFI en kunvenejo de la hotelo (laŭ alvoko). *Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n (ELFI) vuosikokous hotellin kokoustilassa.*

11.30–12.30.....Akceptejo malferma. Lotovendado. Libroservo. *Ilmoittautuminen hotellin kokoustilojen aulassa. Esperantotavaroiden ja arpojen myyntiä.*

12.00–13.00.....Lunĉo en la hotela restoracio (memserva tablo). *Lounas hotellin ravintolassa.*

13.00–15.30.....Malfermo de la Tagoj. Publikaj prelegoj: d-ro Belayne Bekele pri la lingvo amhara (finlingve), Mohammed Bettahar pri spertoj en la movado (Esperante) kaj Arja Kuhanen (IJK en Togo). Poste diskuto. *Päivien avaus. Yleisöluennot suomeksi ja esperantoksi: aiheena Esperanto ja Afrikka. Luennoitsijat: Belayne Bekele (suomeksi amhara-suomi sanakirjasta) kaj Mohamed Bettahar (esperantokokemuksistaan, pääosin esperantoksi), Arja Kuhanen (ensimmäinen esperanton nuorisokongressi Togossa). Luentojen jälkeen keskustelua.*

15.30–16.00.....Kafo/teo. *Kahvi/tee.*

16.00–18.00.....Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). *Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus)*

18.00–19.30.....Prezentado de filmoj kaj fotoj pri eventoj en Afriko (i.a. en IJK). Rakontoj pri la historio de Hyvinkää. Libroservo kaj lotovendado. Libera kunestado. Lotumado fine de la kunestado. *Filmejä ja valokuvia erilaisista E-tapahtumista Afrikassa. Kertomuksia Hyvinkään historiasta. Esperantotavaroiden ja arpojen myyntiä. Vapaata yhdessäoloa. Arpajaiset illanvieton päätteeksi.*

19.30–21.00.....Vespermanĝo en restoracio de la hotelo laŭ mendoj (proprakoste). *Illallinen hotellin ravintolassa etukäteistilausten mukaan (omakustanteisesti).*

DIMANĈO/SUNNUNTAI 18.3.2018

09.00–09.45.....Matenmanĝo en la hotelo (por tranoktatoj). *Aamiainen hotellissa yöpyville.*

10.00–11.00.....Piedirado gvidata de la lokaj esperantistoj de la hotelo al la muzeo. *Kävely paikallisten esperantistien vetämänä hotellilta museolle.*

11.00–12.30.....Gvidata vizito en la Fervoja muzeo de Finnlando. *Opastettu kierros Suomen rautatiemuseossa.*

12.30–14.00.....Fermo de la Tagoj ĉe la muzeo. Lunĉo en konvena proksima restoracio proprakoste laŭvole. *Talvipäivien päätössanat museolla. Lounas sopivassa ravintolassa omakustanteisesti halukkaalle.*

14.00–Bonan hejmvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!*



Malnova preĝejo en Hyvinkää, ĉe Uudenmaankatu, en la centro. Konstruita en 1896. Foto: Raita Pyhälä.

Vintraj Tagoj 2018 okazos en la urbeto *Hyvinkää*, 57 km norde de Helsinko. Tie niaj lokaj aktivaj membroj helpas en la aranĝado. La programo sabate estos en la kunveno de la loka hotelo *Cumulus City Hyvinkää*. Dimanĉe ni kune vizitos la Fervojan muzeon de Finnlando, kiu situas en la urbocentro proksime de la hotelo.

La temo de la Vintraj Tagoj estas **Esperanto kaj Afriko**. En tiu vasta kontinento estas parolataj tre multaj lingvoj kaj ankaŭ la internacia lingvo. Unue ni aŭdos (sabate 17.3. je la 13-a horo) pri la plej malnova ŝtato en la mondo, Etiopio, kiu neniam estis konkerita nek koloniigita malkiel plej multaj Afrikaj landoj, kaj pri vortara projekto amhara-finna. La preleganto, s-ro *Belayneh Bekele* loĝas en Helsinko kaj scias bonege kaj parolas flue la finnan lingvon.

Nian duan preleganton, la esperantiston *Mohamed Bettahar*, multaj el niaj rondoj jam konas. Li venis en 1995 al Finnlando el Alĝerio kaj



ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF
17.–18.3.2018 en Hyvinkää.



Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./retpoŝto: _____

Partoprenkotizo

La kotizo inkluzivas programojn ambaŭtage (ankaŭ muzean viziton) kaj lunĉon kaj kafon sabate.

50 € ĝis 20.2.2018 _____

55 € post 20.2.2018 _____

40 € por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝotizo (pago pri la lunĉo).

Tranoktoj en Hotelo Cumulus City Hyvinkää, mendoj tra EAF:

2-lita ĉambro 48 €/persono/nokto _____

1-lita ĉambro 80 €/nokto _____

Vespermanĝo sabate en restoracio de la hotelo Cumulus City Hyvinkää (ĉ. 30 €): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj, ni informos pri la menuo)

Lunĉo dimanĉe en loka restoracio proksime de la muzeo (ĉ. 20 €): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj, ni informos pri la menuo)

Mi venos al la muzea vizito dimanĉe (fervoja muzeo en Hyvinkää): _____

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto: Helsingin Osuuspankki
FI82 5721 1520 2859 38.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

Pliaj informoj (ekz. alergiaj) aŭ deziroj aŭ

demandoj: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarekatu 15 C 65,

FI-00530 Helsinki.

kaj retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

Bonvenon!



ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville
17.–18.3.2018 Hyvinkäällä.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./sähköposti: _____

Osallistumismaksu

Maksu sisältää viikonlopun ohjelmat (myös mu-
seokäynnin) sekä lounaan ja kahvin lauantaina.

50 € 20.2.2018 asti _____

55 € 20.2.2018 jälkeen _____

40 € FEJO:n varsinaiset jäsenet (alle 30 v). Alle
15 v. lapset ilman osallistumismaksua (maksu lou-
naasta).

Huonevaraus Suomen Esperantoliiton kautta, Hotelli Cumulus City Hyvinkää

2-hengen huone: 48 €/hlö/yö _____

1-hengen huone: 80 €/yö _____

Illallinen lauantaina, Cumulus City Hyvinkää

-hotellin ravintola (noin 30 €): _____

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää
varten, ilmoitamme menusta erikseen)

Lounas sunnuntaina paikallisessa ravintolassa
museon lähellä (noin 20 €): _____

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää
varten, ilmoitamme menusta erikseen)

Osallistun sunnuntaina vierailulle Suomen rau- tatiemuseoon Hyvinkäällä: _____

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille: _____

Tilinumero: Helsingin Osuuspankki

FI82 5721 1520 2859 38.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite-
tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä:

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

Tervetuloa!



Venontaj

rakontos al ni pri sia spertoj kiel enmigranto.
Li parolos esperante kaj informos ankaŭ pri la
Esperanto-movado en Afriko. Pri la sama temo
daŭrigos *Arja Kuhanen*, kiu lastsomere vizi-
tis Togolandon, kie okazis Internacia Junulara
Kongreso, unuan fojon en Afriko. Post la prele-
goj ni diskutos pri la temoj ĝis la kafopaŭzo je
ĉirkaŭ la 15-a horo.

Post la kafa estos la jarkunveno de Esperan-
to-Asocio de Finnlando. La antaŭan tagon oka-
zinta trejnseminario helpas nin en la planado de
la alproksimiĝanta Universala Kongreso, sed
estas grave diskuti kaj interkonsenti ankaŭ pri
aliaj aktivajoj de la asocio.

Ni revenos al la Afrika temo post la jarkun-
veno kaj vidos filmojn tiurilate. Krome ni ek-
konos la historion de Hyvinkää, finstacio de
la unua fervojo en 1862. Pri la historio rakont-
os *Raita Pyhälä*. Fine de la vespero dezirantoj
vespermanĝos kune en la hotela restoracio.

Dimanĉe ni piediros sub gvido de lokaj espe-
rantistoj de la hotelo al la fervoja muzeo. En la
muzeo oni i.a. rakontos al ni pri trajnaj vojaĝoj
antaŭ cent jaroj. Ni vide kaj aŭde, eĉ tuŝe ek-
scios, kia povis esti la veturo de d-ro Zamenhof
kaj lia edzino Klara, haltigitaj pro militdekla-
ro 1.8.1914 en Kolonjo survoje al la deka UK
en Parizo. Ili trajnveturis du semajnojn, ĉirkaŭ
la Botnia Golfo, tra Finnlando, Peterburgo kaj
Moskvo hejmen al Varsovio, kien ili alvenis la
15-an de aŭgusto. Du semajnoj de rifuĝa vetu-
rado: tia bedaŭrinde estis la sola vizito de L. L.
Zamenhof en Finnlando. – Klara havis poste
ŝancon en pli agrabla okazo gastigi en Finnlando,
en la 14-a UK en Helsinko en 1922.

Post la muzea vizito kaj oficiala fermo de la
Tagoj ni, kiuj deziras, ankoraŭ lunĉos kune en
konvena restoracio.

Aliĝinformoj

Vi povas aliĝi aŭ sendante per poŝto la apudan
aliĝilon al EAF aŭ retpoŝte al la adreso eafmendoj@esperanto.fi kaj pagante la koncernajn pag-
ojn al la konto de EAF. Memoru uzi referenc-
numeron sen indiki temon de la pago. Bonvolu

noti, ke ne sufičas nur sendi la pagon al la konto, ĉar ni bezonas krome scii, kiujn programe-rojn vi partoprenos. Lokojn por la muzea vizito dimanĉe ni rezervos laŭ viaj informoj (kunportu muzean karton, se vi havas tion).

Notu ke por la manĝoj ni dezirus scii pri viaj eblaj alergiaj. Lunĉo kaj kafo sabate estas inkluzivitaj en la programo. La vespermanĝon sabate kaj lunĉon dimanĉe ni mendos laŭ aliĝoj (vidu aliĝilon) kaj informos pri la menuoj pli proksime. Hotelo Cumulus City Hyvinkää ofertas al ni ĉambrojn je speciala prezo, se la mendoj okazos tra EAF. Bonvolu mendi laŭ la aliĝilo.

Vi povas demandi koncernajn aferojn jene: oficialaj kunvenoj kaj programaj aferoj: Tuomo Grundström kaj Tiina Oittinen, tranoktado kaj manĝoj: Paula Niinikorpi kaj Tiina Oittinen, monaferoj: Tiina Kosunen, alveno al Hyvinkää kaj pri la urbo: Raita Pyhälä, raita.pyhala@gmail.com kaj Sirkka Mattlin, sirkkamattlin@gmail.com.

La kontaktoinformojn de funkciuloj de EAF vi trovas sur la paĝo 2.

Pliaj informoj pri la Tagoj aperos en Esperanto-lehti 1/2018 kaj sur la retpaĝoj: www.esperanto.fi.

Talvipäivät Hyvinkäällä tarjoavat jälleen uutta ja mielenkiintoista esperantomailmasta: teemaksi on valittu Esperanto ja Afrikka. Suuresta ja monille varsin tuntemattomasta maanosasta kuulemme sekä sieltä kotoisin olevien kertomana että siellä vierailleilta.

Helsingissä asuva Belayneh Bekele kertoo sujuvalla suomella maailman vanhimman valtion, Etiopian, kielioloista ja amharan kielestä, jonka ensimmäistä suomalaista sanakirjaa hän laatii. Esperantoksi kuulemme Mohamed Bettaharin kokemuksia Suomeen muuttaneena algerialaisena sekä myös Esperanton käytöstä Afrikassa. Ensimmäinen Afrikassa järjestetty esperanton nuorisokongressi oli tänä kesänä Togossa ja siitä meille kertoo mukana ollut Arja Kuhanen. Näemme myös esperantonkielisiä filmejä, jotka esittelevät Afrikkaa.

Luennoille ja keskustelulle varatun ajan (lauantaina 17.3. klo 13–15) sekä kahvin jälkeen on vuorossa liiton vuosikokous, johon myös odotamme runsasta osanottoa. Meillä on edessä työntäyteinen puolitoista vuotta valmistautessamme Esperanton 104. maailmankongressiin. Kaikkien panosta tarvitaan. Ei myöskään pidä unohtaa kongressijärjestelyjen vuoksi tavallista toimintaamme.

Iltaa voimme vielä jatkaa Afrikka-teman merkeissä sekä tutustumalla Hyvinkään historiaan, josta Raita Pyhälä on luvannut kertoa meille. Yhteisellä illallisella on mukava vielä keskustella eri asioista.

Sunnuntaina paikalliset esperantistit johdattavat meidät hotellilta Suomen rautatie-museoon. Museossa meillä on suomenkielinen opastus ja kuulemme erityisesti kertomaan junien matkustusmukavuudesta reilut sata vuotta sitten. Silloinhan Ludwik ja Klara Zamenhof joutuivat yllättäen matkustamaan sotapakolaisina Tanskan, Ruotsin ja Suomen Pietariin ja edelleen Varsovaan; suurin toivein alkanut matka Pariisiin maailmankongressiin vuonna 1914 keskeytyi suursodan syttymiseen 1. elokuuta, jolloin Zamenhofit olivat Kölnissä. Paluumatkasta muodostui paitsi ikävä myös pitkä ja vaivalloinen – Varsovaan he saapuivat 15. elokuuta. Zamenhof kuoli vuonna 1917, mutta Klara teki toisenkin ja miellyttävämmän matkan Suomeen, 14. maailmankongressiin Helsinkiin vuonna 1922. Talvipäivien loppuksi syömmme vielä lounasta yhdessä. Hyvinkääläiset etsivät meille sopivan ravintolan.

Ilmoittautuminen

Ilmoittaudu lähettämällä oheinen lomake Suomen Esperantoliittoon tai samat tiedot sähköpostilla osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä tarvitaan myös tiedot siitä, miten olet osallistumassa ohjelmaan. Paikat illalli-

»»

selle lauantaina varaamme ennakoilmoittautumisen mukaan, lähempänä päiviä ilmoitamme vielä menuvaihtoehtoja. On myös tarpeen tietää sunnuntaina museokäynnille osallistuvat, sisäänpääsymaksu kuuluu ohjelmaan (jos sinulla on museokortti, hyödynnä sitä). Majoituksen ja muut ruokailut jokainen hoitaa ja maksaa erikseen.

Hotelli Cumulus City Hyvinkää on antanut meille tarjoushinnat yöpymisiin, jos niiden tilaus tapahtuu liiton kautta. Tilaa ilmoittautumislomakkeen tietojen mukaan. Yhteyshenkilöiltä saat tarvittaessa opastusta ja lisätietoja.

Talvipäiviin liittyviä asioita voit tiedustella liiton toimihenkilöiltä seuraavasti: liiton vuosi-

kokous ja muiden kokousten järjestäminen sekä ohjelmatiedot: Tuomo Grundström ja Tiina Oitinen, yöpyminen ja ruokailut: Paula Niinikorpi, maksuasiat: Tiina Kosunen. Liiton toimihenkilöiden yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.

Hyvinkäällä asuvilta Sirkka Mattlinilta, sirkkamattlin@gmail.com ja Raita Pyhälältä, raita.pyhala@gmail.com voit kysyä tietoja kaupungista ja liikenneyhteyksistä sinne.

Lisätietoja talvipäivistä on seuraavassa Esperantolehdessä. Seuraa myös tiedotusta liiton verkkosivuilla www.esperanto.fi.

Bonvenon! – Tervetuloa!
Estraro, hallitus

Membrokotizoj de UEA 2018 – Esperanton maailmanliiton jäsenmaksut 2018

Membrokotizoj:

MG-membro 11 € (gvidlibro kaj *Esperanto* rete)

MJ-membro 26 € (jarlibro kaj *Esperanto* rete)

MA-membro 64 € (jarlibro kaj *Esperanto* poŝte)

DM-membro 1600 € (dumviva membro kun jarlibro kaj *Esperanto*, 25 x MA)

DMJ-membro 650 € (dumviva membro kun jarlibro kaj reta *Esperanto*, 25 x MJ)

Ĝis la aĝo 35 (naskita 1.1.1983 aŭ poste) oni estas ankaŭ membro de TEJO kaj ricevas revuon *Kontakto* en la kategorioj MA, MJ kaj DM.

Jäsenmaksuja:

MG-jäsen 11 € (ohjekirja ja *Esperanto* sähköisenä)

MJ-jäsen 26 € (vuosikirja ja *Esperanto* sähköisenä)

MA-jäsen 64 € (vuosikirja ja *Esperanto* postitse)

DM-jäsen 1600 € (ainaisjäsenyys, 25 x MA, vuosikirja ja *Esperanto* postitse)

DMJ-jäsen 650 € (ainaisjäsenyys, 25 x MJ, vuosikirja ja *Esperanto* sähköisenä)

Korkeintaan 35-vuotiaas MJ-, MA- tai DM-jäsen on myös TEJO:n jäsen ja saa lisäksi *Kontakto*-lehden (s. 1.1.1983 jälkeen).

Lehtiä - Gazetoj:

Esperanto 41 €

Kontakto 25 € (papere/paperisena)

Kontakto 9 € (rete/sähköisenä)

Monato 57 € (60 € aerpoŝte/lentopostina)

Monato 34,20 € (rete/sähköisenä)

La Ondo de Esperanto 15 € (nur rete/vain sähköisenä, pdf aŭ/tai ePub)

Pagoj al konto - Maksut tilille:

FI44 5630 4550 0426 25

Pliaj informoj / Tiedustelut:

Paula Niinikorpi (ĉefdelegito)

Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori

puh/tel. 040 527 4821, cefdelegito@esperanto.fi

Ĉu parolviro fariĝu parolgvidanto?

En Finnlando vekigis vigla diskuto, kiam la grava ĵurnalo *Aamulehti* decidis, ke ĝi ne plu uzos seksismajn vortojn por profesioj kaj titoloj. Ekzemplo de tio estas prezidanto de parlamento, nuntempe konata finne kiel *puhemies*, svede *talman* (tradukite parolviro). Anstataŭ tio la ĵurnalo uzos la vorton *puheenjohtaja* (parolgvidanto, t.e. prezidanto).

La finna lingvo multe evoluis tiurilate. Antaŭ cent jaroj estis apartaj vortoj por profesiaj viroj kaj virinoj (finaĵo *-tar*), ekz. *opettaja/opettajatar* (instruisto/instruistino), *näyttelijä/näyttelijätär* (aktoro/aktorino). Tiu uzo tamen fariĝis eksmoda antaŭlonge.

Tamen daŭre ekzistas nomoj de profesioj kaj titoloj, kiu enhavas vorton *-mies* (viro), sed kiuj povas esti uzataj same parolante pri viroj kaj virinoj. Kelkaj ofte uzataj – krom la jam menciita *puhemies* – estas *lakimies* (leĝviro, t.e. juristo), *esimies* (antaŭviro, t.e. estro) kaj *lehtimies* (ĵurnalviro, t.e. ĵurnalisto).

Oni ofte pensas, ke la finna estas malseksisma lingvo, ĉar la vortoj tute ne havas sekson. Konsekvence, ekzistas nur unu pronomo en la tria persono. ‘Hän’ estas uzata sendistinge ĉu temas pri viro aŭ virino. Same estas ekz. en la estona, sed en hindeŭropaj lingvoj oni apenaŭ povas paroli pri homo en la tria persono sen indiki la sekson.

Antaŭe, ekz. en la 19-a jarcento, oni ne konsideris tion problemo. Lastatempe kreskis sentemo kontraŭ tia uzo. La problemo pliakriĝas, kiam disvastiĝas ebleco ne indiki sekson. En Kanado ĉi-jare eblas registriĝi anstataŭ viro aŭ virino kiel ‘X’. Laŭ iuj fontoj ekzistas almenaŭ ok aliaj landoj, kie la sekso povas esti registrita kiel nek vira nek virina.

En diversaj lingvoj oni klopodis trovi diver-

sajn solvojn. En nuntempa sveda lingvo estas *han* por viro, *hon* por virino kaj *hen* sen indiko pri sekso. Ekzistas ankaŭ genitiva formo *hens*. Tiuj formoj ne plene enradikiĝis, ŝajne ili estas tro artefaritaj por kelkaj. En la angla oni uzas *they/their* anstataŭ *he* aŭ *she*. Ankaŭ tiu uzo estas daŭre diskutata.

Bedaŭrinde Esperanto, kiu devus esti modela lingvo, restis je la nivelo de la 19-a jarcento. Inluataj de naciaj lingvoj, kelkaj esperantistoj daŭre uzas in-formojn, eĉ kiam ili estas superfluaĵ, ekz. instruistino anstataŭ instruisto. Ankaŭ pri pronomoj ne estas konsento. Iuj proponis *ri* = li aŭ ŝi, sed tiu ne enradikiĝis. Nek enradikiĝis *ĝi* en tiu signifo, kvankam oni trovas ekzemplojn de tio jam en Zamenhofaj tekstoj.

Multaj finnoj, eĉ lingve spertaj, ofte elektas malĝustan pronomon parolante pri homoj en la tria persono. Tio okazas ne nur en Esperanto sed parolante kiun ajn lingvon kiu uzas apartajn pronomojn por viroj kaj virinoj. Mi mem spertis ke tiu elekto ne estas aŭtomata en la cerbo, sed por elekti la ĝustan pronomon mi devas aparte pripensi la aferon. Verŝajne por parolantoj de hindeŭropaj lingvoj ne estas tiel. Estus interese scii, kiel tio okazas ĉe parolantoj de aliaj lingvoj.

Laste, mi notu interesan neologismon en la finna: *muusu* = *muu[n]su[kupuolinen]*, laŭvorte aliseksa, do nek viro, nek virino. Kiel oni dirus tion en Esperanto? Laŭ PIV aliseksa jam havas signifon ‘apartenanta al la alia sekso’. Sen la difina artikolo la klarigo povus esti akceptebla. Kun ĝi eĉ nia vortaro estas seksisma.

Sakari Kauppinen
esperantohelsinki.wordpress.com

Somera Kurso 5.–9.6.2018, Wellamo-opisto, Lahti

La venontan Someran Esperantokurson de EAF kaj ELFI ni havos komence de junio en la estonta kongresa urbo, Lahti. Ĉi-foje ni kunlaboras kun la loka instituto, Wellamo-opisto, kiu ofertas je nia dispono la ejojn. Nia eksterlanda instruisto *Nina Pietuchowska* venos el Pollando. Ŝi plejparte instruos la progresantojn. *Sylvia Hämäläinen* gvidos la finnlingvan, elementan grupon kaj *Tiina Oittinen* estos denove kursorospondeculo. Partoprenos kaj helpas en la aranĝado ankaŭ lahti-anoj *Börje Eriksson* kaj *Timo Väänänen*, kun kiuj ni certe havos multflankan kaj amuzan libertempan programon.

Kiel ĉiam ni lernos la lingvon ne nur en klasĉambro, sed ankaŭ en praktikaj situacioj: dum vizitoj ĉe la lokaj vidindaĵoj, dum promenadoj en la belaj parkoj de la urbo, dum butikumado, dum kunkantado ktp. Ni kompreneble kafumos kaj manĝos kune kaj ankaŭ tiam diskutos vigle esperante. Bona ekzercado antaŭ la kongreso.

Nina Pietuchowska rakontas jene pri si mem: *“Mi estas esperantistino de 1988. Mi laboris kiel instruistino pri fiziko kaj kemio. Nun mi estas pensiulino. De multaj jaroj mi instruas Esperanton en Pollando, en Bjalistoko. Mi ankaŭ instruis eksterlande: dum Somera Esperanto Studado (SES) en Slovakio, dum Baltiaj Esperanto Tagoj (BET) en Litovio kaj Latvio, dum Itala Esperanto Kongreso (IEK) en Italio, dum Junulara Esperanto-Semajno (JES) en Slovakio, Pollando kaj Germanio. Sekvontprintempe mi instruos en Francio. Mi ankaŭ gvidis kurson por malbone vidantaj personoj.”*

Kursokotizoj: 95 € (tuta kurso) aŭ 30 € (unu tago). Ĝi enhavas la materialon de la instruistoj kaj kafon/teon kun manĝajeto en la kursejo ĉiutage. Aliajn manĝojn kaj muzeajn vizitojn ĉiu pagos mem same kiel tranoktadon. Notu



Nina Pietuchowska

jam la kursodatojn kaj sciigu viajn geamikojn kaj gekonatulojn.

Informiĝu kaj aliĝu al sekretario de EAF: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358-50-5494709. Informojn pri kursopraktikaĵoj (ekz. tranoktejo) donas ankaŭ Börje Eriksson el Lahti, bovoeo73@gmail.com. En venontaj gazetaj numeroj kaj en niaj retpaĝoj aperos printempe pliaj informoj kaj la detala kursoprogramo. Finnlingve informoj troviĝas ankaŭ sur paĝoj de Wellamo-opisto www.wellamo-opisto.fi.

Ensi kesänä Suomen Esperantoliiton (EAF) ja Suomen opettajien esperantoyhdistyksen (ELFI) järjestämä kesäkurssi on 5.–9.6. Lahdessa, tulevassa maailmankongressikaupungissa. Yhteistyökumppanina on paikallinen Wellamo-opisto, jonka tiloissa kurssi pidetään.

Pääopettajaksi saamme Nina Pietuchowskan Puolasta. Suomenkielisenä opettajana on Sylvia Hämäläinen ja kurssivastaavana Tiina Oittinen. Paikalliset Börje Eriksson ja Timo Vää-

nänen osallistuvat vapaa-ajan monipuoliseen ohjelmaan. Opiskelemme perinteisesti luokassa, mutta myös tutustumme kaupunkiin ja käytämme esperantoa siellä mm. ostoksilla ja nähtävyyksiä katsellen. Kahvi- ja ruokailutaumat ovat hyviä hetkiä vapaaseen keskusteluun ja kielen harjoitteluun, kun kaikki ryhmät ovat yhdessä.

Ensi kesän opettajamme Nina Pietuchowska tutustui esperantoon vuonna 1988. Hän on fyisiikan ja kemian opettaja, nykyään eläkkeellä. Esperantoa hän on opettanut niin kotimaassaan Puolassa (mm. Zamenhofin syntymäkaupungissa Bialystokissa) kuin ulkomailla kuten Baltiassa, Italiassa, Slovakiassa ja Saksassa. Hän on opettanut esperantoa myös näkövammaisille.

Kurssimaksut: 95 € (koko kurssi) tai 30 €/päivä. Maksuun sisältyy opettajan materiaali sekä kahvi/tee sopivan kahvileivän kanssa kurs-

sipaikalla päivittäin. Muut ruokailut, museoiden pääsymaksut ja muut kulut sekä majoituksen kukin hoitaa itse.

Ilmoittautuminen EAF:n sihteerille: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi tai tiina.oittinen@pp.inet.fi, puh. 050 549 4709. Häneltä saat myös lisätietoja kurssista. Kurssikäytännöistä ja Lahteen liittyvistä asioista, mm. majoittumisesta, antaa tietoa: Börje Eriksson, bovoeo73@gmail.com, puhelin: 040 779 3487.

Merkitse jo nyt kurssipäivät kalenteriisi ja kerro kurssista myös ystäville ja tuttaville. Kurssin tarkemmat tiedot tulevat lehden seuraaviin numeroihin ja kotisivuillemme www.esperanto.fi. Kurssitiedot ovat myös Wellamo-opiston sivuilla, www.wellamo-opisto.fi

Bonvenon al Lahti! Tervetuloa Lahteen!

Kunveno en littala



Kunveno

Ni havis malgrandan kunvenon en la biblioteko de Iittala. Markku Sarastamo rakontis pri du grandaj nomoj en la esperantohistorio: Hector Hodler (1887–1920) kiu kunfondis UEA kaj Edmond Privat (1889–1962) kiu skribis lernolibron Karlo (jaro 1909). Kun-

venolingvoj estis Esperanto kaj la finna. La sekva kunsido estos en februaro.

En la foto: partoprenantoj de maldekstre estas: Marjatta, Eija, Kaija, Talvikki-Pirola, Markku, Kati, Jatta.

Markku Sarastamo

UEA ŝanĝas sian Ĝeneralan Direktoron, celas financon resanigon

En kunsido la 31-an de oktobro, la Estraro de UEA decidis pri grava ŝanĝo en la administrado de UEA, kun la konsento kaj subteno de la Ĝenerala Direktoro. D-ino *Veronika Poór*, kiu laboras en la Centra Oficejo ekde la komenco de 2016, kaj kiel Ĝenerala Direktoro ekde majo 2016, transdonos sian postenon la 1-an de januaro 2018 al s-ro *Martin Schäffer*, la nuna Ĝenerala Sekretario. Kiel volontula estrarano, Schäffer gvidis la financajn analizojn kaj oficejan konsultiĝon, kiuj motivis la decidon. Transprenante sian novan rolon, li demetos siajn postenojn kiel estrarano kaj komitatano.

”Rigardante nian malfacilan financon situacion, kaj konsultinte niajn oficistojn, ni venis al la konkludo ke necesas freŝa komenco,” klarigas d-ro *Mark Fettes*, la Prezidanto de UEA. ”La Asocio survojas al kelkaj gravaj renovigoj, kiuj postulas fokusitan kaj harmonian kunlaboron. Feliĉe ni havas tiucele la plenan subtenon de d-ino Poór, kiu aktive kunlaboros por kiel eble plej glata transiro dum kelkmonata periodo.”

D-ino Poór konsentas: ”La nuntempa situ-

acio de la Asocio necesigas Ĝeneralan Direktoron, kies fortaj flankoj estas aliaj ol la miaj el la tre diversaj kaj vastaj kapabloj atendataj de la postenulo. Mi tre ĝojas, ke mi povos transdoni la taskaron al persono, kiu kaj tre bone konas la Asocion, kaj havas profundajn konojn en la plej bezonataj laborkampoj.”

Schäffer, multjara komitatano de UEA kaj estrarano ekde 2013, laboros ĉefe en siaj kutimaj loĝlokoj en Meksiko kaj Germanio, sed en konstanta kontakto kun la Oficejo. Li antaŭvidas bonan kunlaboron kun siaj kolegoj en Roterdamo kaj en la Estraro.

”Zorga administrado de niaj financaj rimedoj estas unu el la ĉefaj devoj al niaj membroj,” komentas Schäffer. ”Kvankam la nuna situacio estas malfacila, ni havas kapablajn oficistojn kaj volontulojn, kaj multajn ŝancojn por asocia evoluigo. Mia celo estos iom post iom proksimigi nin al ekvilibro inter enspezoj kaj elspezoj, dum ni daŭre investas en informado, instruado kaj aktivula trejnado tra la mondo.”

GK 713

Mondmapo de Esperanto-Asocioj

En nia nova paĝo *Esperanto.net* (ne preta) estas mondmapo kun Esperanto-asocioj.

Por teknike agordi ĝin ni uzis malnovan datumbazon kaj pro tio en ĝi ankoraŭ mankas informoj pri kelkaj asocioj, aŭ la informoj estas malĝustaj.

Do ni petas, ke vi vizitu <http://esperanto.net/eo/lokaj-organizoj> kaj kontrolu la informon pri via urbo. Vi povas tajpi la nomon

de via urbo en la kadro aŭ premi la regklavon (CTRL) de via klavaro kaj samtempe ruli la centran radeton de via komputila muso por pli-grandigi la areon serĉatan.

Se vi trovas eraron aŭ mankon en la mapo, bonvolu indiki tion per nia formularo:

<http://tinyurl.com/mondmapo>

GK 712

Ĉu rekta maŝininterpretado jam realaĵo?

Antaŭ kelkaj semajnoj mi publikigis blogaĵon pri la progreso de aŭtomata (maŝina) tradukado. Pasintsemajne (oktobre) la usona firmao *Google* lanĉis kapaŭskultilon kiu interpretas parolon rekte de unu lingvo al alia. Oni konektas la aŭskultilon – nomitan *Pixel Buds* – al saĝtelefono de la firmao kaj helpe de la gugla tradukprogramo ĝi kapablas traduki inter 40 lingvoj. Kelkaj jam konjektis, ke post mallonga tempo – eble dek jaroj – lingvolernado fariĝos superflua.

Mi povas nur ripeti la konkludojn kiujn mi faris en mia antaŭa skribaĵo. Ne eblas nek indas haltigi la evoluon. Same kiel poŝkalkuliloj forigis grandan parton de enkapaj kalkuloj, estas antaŭvideble ke poŝtradukiloj anstataŭigos parton de homa interpretado.

Kompreneble ili ne forigos ĉian bezonon de lernado de fremdaj lingvoj. Tamen simplajn taskojn oni povos plenumi – en proksima estonteco – per tia aparato: ekz. turisto demandas pri vojo, aĉetas biletojn au mendas manĝaĵon en restoracio.

Jam venis reagoj de profesiaj interpretistoj. Ili diris, ke tiuj aparatoj apenaŭ detruos ilian laboron. La programvaro kapablas traduki unuopajn vortojn, sed ne tiom bone longajn frazojn. Iu diris, ke ili, do la tradukistoj, ne estos anstataŭigitaj de maŝinoj, sed fare de aliaj inter-

pretistoj uzantaj maŝinojn. Fakte tiuj programoj multe helpas en la laboro de tradukistoj.

Unu danĝero estas, ke la homoj fidas tiajn tradukojn senpripense. Oni kalkulis, ke nuntempe unu triono de ĉiuj tekstoj legataj de finnoj estas tradukaĵoj. Ni ĉiuj spertis, ke granda parto de ili estas pli-mapli fuŝaj. Ekz. uzinstrukcioj de aparatoj faritaj en foraj landoj ofte estas nekompreneblaj.

La esploristo *Lotta Jalava* ĉe Universitato de Helsinko diris “maŝina tradukado estos tre utila ilo en praktikaj ĉiutagaĵoj. Problemoj aperos, se oni devas traduki nuancojn, humuron, sarkasmon – aŭ interŝanĝi ideojn. Dum oni komprenas la mankojn de la tekniko, maŝinaj tradukiloj estas bona afero”. (Laŭ artikolo publikigita de *Yle*).

Mi mem spertis, ke la Gugla tradukilo ankoraŭ ne estas liveranto de perfekta traduko sed ĝi estas tre utila ilo por lingvolernanto. Per ĝi vi povas serĉi eblajn tradukojn kaj ricevi solvojn kiujn vi mem ne eltrovis. Ĉe legado de fremdlingvaj tekstoj ĝi ofte konas vortojn kiuj ne aperas en presitaj vortaroj. La lernado de fremda lingvo fariĝas pri rapida kaj amuza.

Sakari Kauppinen
esperantohelsinki.wordpress.com

Vortoj kaj frazoj

”Lippahivo – Gåsinkosars – Čiehkka – Malaperejo”

Nia malgranda bieno en *Iisalmi* nomiĝas *Lippahivo*. Ĉi tiu estas savoa vorto kaj tre malfacile tradukata en la finnan. Mi penis traduki ĝin en la svedan, la nord-samean kaj Esperanton kaj fiksas la kvarlingvan ŝildon sur la

muron. Kion vi opinias pri la vorto Lippahivo kaj la tradukoj?

Reino Eriksson
Lippahivo, Iisalmi


Karpata semajno

Pro la konata kaŭzo *Volodimir Hordijenko*, fama kiova esperantisto, ne plu aranĝas Aroman Jalton en Krimeo. Li ŝanĝis lokon kaj nomon de la evento. Nuntempe li organizas Karpatajn semajnojn en la fama urbo *Lviv* aŭ proksime de ĝi. Ĉi-jare Karpata semajno okazis en la urbeto *Morŝin* dum la tempo 29.10.–05.11. Morŝin estas konata pro saniga minerala akvo kaj multaj banejoj. La granda banejo *Valanda* estis la bazo de la Karpata semajno.

Troviĝis bonaj lokoj por aktivado, loĝado kaj manĝado per tre modestaj kostoj. Oni povis atendi, ke pro la suda situo de la loko la loka temperaturo estus pli varma ol ekzemple en Kiovo, sed okazis male. Blovis malvarma norda forta vento. Nur la plej lastaj tagoj estis agrable varmaj. Malgraŭ la malvarma vetero la etoso dum la semajno estis varma en la malgranda partoprengrupo, kiu konsistis el tri eksterlandanoj kaj kelkmultaj ukrainanoj.

Pro varia lingvokono de la partoprenantoj, oni formis du grupojn. Volodimir gvidis la grupon de progresantoj kaj *Svetlana Pogorelaja* prizorgis la alian grupon. Oni laboris antaŭtagmeze kaj ekskursis posttagmeze. Marde okazis la tuttaga ekskurso al *Lviv*, kie nin gvidis loka esperantisto, amiko de Volodimir. Dum la duontagaj ekskursoj ni vidis multajn interesajn lokojn de la karpata montaro, riverojn, akvofalojn, strangajn rokformaĵojn, fortikajon, ktp. Ni veturis per karpata trajno kaj vagadis sur montoj. Malfruvespere okazis tiel nomataj legadvesperoj en la ĉambro de Volodimir. Oni diskutis, drinkis bongustan vinon, manĝis vinberojn, ĉokoladon kaj panon. Ofte la vesperoj daŭris gaje ĝis meznokto.

Evidente ekzistis du kaŭzoj, kiuj limigis partoprenantojn de la evento. Eksterlandanoj probable timis vojaĝi al la lando, kie oni militas. Ukrainanoj havas modestan salajron kaj tial malofte eblas vojaĝi. La milito en Morŝin estis videbla nur en memortabuloj de mortintaj he-



La domoj rokas.



Ĉe rivero.

rooj. Centre de la urbeto estis starigita tabulo kun fotoj kaj nomoj, bele ornamita per floroj.

Ĉar Volodimir havas longan sperton en la organizado, ĉio okazis senprobleme kaj glate. La grupon de progresantoj li gvidis suverene kaj gaje. Krom la severa laboro oni havis multajn tre agrablajn momentojn kiam ni ludis kaj ridegis. Kompare al tagoj de Aroman Jalto oni eble perdis nur la maron. La etoson oni sukcesis savi kaj teni. Venontjare oni renkontiĝos en *Lviv*. Ĝis revido!

Bruno Lehtinen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kuappinen@gmail.com
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere www.esperanto.fi/grupoj/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. <http://www.stelete.fi/> ☎ (09) 660 651 stelete@pp.inet.fi
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). bovoe73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteysenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2018

Nro	Limdato	Aperas
1/2018	28.1.	en februaro
2/2018	31.3.	en aprilo
3/2018	31.5.	en junio
4/2018	1.9.	en septembro
5/2018	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivu/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivu/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.



Posti Green

Esperanto-societo Antaŭen informas

Antaŭen havis siajn elekto- kaj estrarkunvenojn en novembro kaj decembro.
Estraranoj por la jaro 2018 estos jenaj:

- *Tapani Aarne*, prezidanto/kasisto
- *Raimo Tuisku*, vicprezidanto
- *Sylvia Hämäläinen*, sekretario
- *Markku Saastamoinen*, estrarano
- Vicestaranoj: *Terhi Laaksonen* kaj *Marjatta Ström*.
- Agadkontrolantoj: *Paula Niinikorpi* kaj vice *Anja Karkiainen*.

Eventoj en la jaro 2018 en la klubejo "Nesto":

- 08.01. je la 17.00: Januara vespero
- 17.01. je la 11.30: Esperanto-klubo
- 05.02. je la 17.00: Februara vespero
- 19.02. je la 17.00: Jarkunveno
- 05.03. je la 17.00: Marta vespero
- 09.04. je la 17.00: Aprila vespero

Bv. vidi precize pri temoj de vesperoj ktp. ĉe la retejo de EAF:
www.esperanto.fi/grupoj/tampere/

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 28.1.2018 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2018 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.